

## *Reĝido, kiu savis la gepatrojn per sia karno*

Fabelo el *saṃyukta-ratna-piṭaka-sūtra*

[laŭ ĉina traduko]

雜寶藏經卷一の第二

trad. **Ŝoose Minami**, Japanio

Tiel mi aŭdis: Iam Budao estis en Ŝravasti. Tiam Ananda kun vazo en la manoj almozpetadis en la kastelo. Li trovis unu infanon almozpetantan, kiu havas blindajn gepatrojn. Kiam la infano ricevas manĝaĵojn, li ofertas bonajn al la gepatroj kaj malbonajn li mem manĝas.

Ananda diris al Budao. "Estas tre mirinde, ke tiu infano ofertas bonajn manĝaĵojn al la gepatroj kaj nur malbonajn li mem manĝas." Budao diris: "Tio ankoraŭ ne estas malfacila. En antaŭnaska vivo mi servadis al la gepatroj. Tio estis por mi treege malfacila." Ananda demandis Budaon. "Kion signifas viaj vortoj?"

Budao komencis rakonti: "Antaŭ longa longa tempo estis granda reĝo, kiu regis landon. La reĝo havis ses filojn. Ĉiu el ili regis po unu lando. Estis ministro nomata Rahragupta. Li havigis al si armeon kaj mortigis la reĝon kaj liajn kvin filojn. Pli antaŭe Démono aperis antaŭ la sesa reĝido kaj diris: -Viaj patro kaj kvin fratoj estos mortigitaj de ministro Rahragupta kaj li mortigos ankaŭ vin mem. Aŭdinte tion la reĝido revenis hejmen. Lia edzino vidis lian palan vizaĝon kaj demandis, kial li estas tiel pala. Li responde diris: - Mi ne bezonas diri al vi pri la afero de viro. La edzino diris: - Mia kara, nun mi ja estas kun vi en la sama sorto. Kial do vi ne diras al mi? Kaj la edzo diris al ŝi: - Démono venis al mi kaj diris, ke oni mortigos la patron kaj ĉiujn fratojn kaj fine mortigos min mem. Mi ne scias, kiel fari! Jen tio min ĉagrenas.

La geedzoj intencis forkuri en fremdan landon kaj ili kunportis manĝaĵojn por sep tagoj. Sed pro konfuziĝo ili eraris sur la vojo kaj eĉ post dek tagoj ili ne atingis la celitan lokon. La manĝaĵoj iom post iom malaperas kaj ili estas preskaŭ mortantaj de malsato. Li pensis: - Estu pli bone ke mi mortigu unu kaj tenu la du vivojn. Li eltiris la glavon kaj intencis mortigi sian edzinon. Lia infano vidis tion kaj diris al la patro kun la manoj kunpremitaj: - Mi elkore petas vin, ke vi ne mortigu la patrinon, sed mortigu min mem anstataŭ la patrinon! Aŭdinte la vortojn de sia infano la patro intencis mortigi lin. La infano denove diris: - Ne mortigu min, mi petas. Se vi

mortigos min, mia karno baldaŭ putriĝos kaj ne restos longe. Mi ankaŭ timas, ke la patrino ne povus antaŭeniri trankvile. Do vi ĉiutage deprenu de mi po mulmulte da karno.

Kvankam ili ankoraŭ ne atingas homan loĝejon, la karno de la infano malmultiĝis kaj jam restis nur tri pecoj. La infano diris al la gepatroj: - Vi ambaŭ manĝu tiujn ĉi du pecojn. Se unu restos, donu al mi ĝin, mi petas. La gepatroj forlasis la infanon kaj iris pluen.

Tiam la palaco de Ŝakutiindra tremis. Li trovis la infanon kaj prenis sur sin la formon de malsata lupo. La infano pensis: - Eĉ se mi manĝos tiun ĉi pecon de la karno, mi certe mortos, ĉiuokaze mi perdos la vivon. Kaj li donis ĝin al malsata lupo. Ŝakutiindra ŝanĝis sin en homon kaj demandis la infanon: - Ĉu vi nun pentas, ke vi donis al la gepatroj vian karnon? La infano respondis: - Se mi ne pentos, mi refoje prenos la antaŭan korpon. Se mi pentos, mi tuj mortos. Ĉe tio li reprenis la antaŭan korpon. Ŝakutiindra kunigis la infanon kaj liajn gepatrojn. La reĝo de tiu lando admiris la sindoneman servadon de la infano kaj li donis armeon por ke ili revenu hejmlandon.

Tiama infano estas mi mem, tiamaj gepatroj estas miaj nunaj gepatroj."